LA SUDO _ Le sud

muziko kaj franca teksto Nino Ferrer
e-a teksto pluropo

(enkonduko) la la la …

(strofo 1)
Similas land' jena al Luiziano
Al Itali'
Vestaĵoj pende sekiĝas sur teraso
Kaj belas ĝi

(refreno 1)
Similas al Sud'
Longtempas la te-emp'
Kaj la vivo dum
Pli ol jarmilion'
Ĉiam dum belsezon'

(ponto 1) la la la …

(strofo 2)
Infanosvarm' rulas sin sur herbtapiŝo
Kun hundorond'
Eĉ estas kat' kaj testud' kaj oraj fiŝoj
Jen senmanka mond'

(refreno 2, kiel refreno 1)

(ponto 2) la la la …

(strofo kaj refreno senvortaj) di di di …

(ponto 3) la la la …

(strofo 3)
Fatale iam okazos la milito
Ja scias ni
Ni ĝin ne ŝatas sed restas sen decido
"Kulpas sort'" diras ni

(fina refreno)
Domaĝe por Sud'
Je ĉi latitu-ud'
Ni vivintus dum
Pli ol jarmilion'
Ĉiam dum belsezon'

Versio 2016 09 06